Friedrich Schiller,

# Espero

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

Tre multte homar' kun espero en koro
Pri vivo estonta parolas,
Kaj ĉiam al celo feliĉa kaj ora
Aliri plej baldaŭ ĝi volas.
Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras, –
Sed homo esperon senĉese adoras.

Espero kun li sen-aparte vivadas;
Ĝi knabon dorlotas, junulon
Per sorĉa radio ĝi gaje logadas,
Konsolas ĉe tomb' maljunulon :
Li tre lacigita per vojo de tero,
Foriras en tombon kun dolĉa espero.

Ho, ne! ĝi ne estas elpenso malvera,
Per revoj malsaĝaj naskita!
Ni scias, ni sentas kun kredo sincera,
Ke estos esper' plenumita.
Kaj tiu ĉi sento ĉu estas kapabla
Nin trompi en nia revaĵo agrabla?

*Traduko de la Germana poemo "Hoffnung" de* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* VASILIJ DEVJATNIN *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1015-2056 (2014-05-20 12:14:13)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin`. *La poem-esperantigo troviĝas en* `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`.